



La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio
Fondita en Julio 1920.

Redakcio-Administracio :

Box 731F, Elizabeth-str: P.O., Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por 12 numeroj):

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj. Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj.

Redaktisto: Reginald Banham, F.B.E.A.

Specimena numero—unu respondkupono aŭ 30 c. U.E.A. kupono.

Unu numero: 4 pencoj.

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 134 (Tenth Year) Melburno (Melbourne), Aŭstralio. AŬGUSTO, 1931

ESPERANTO ON THE MARCH.

Since our last issue we have learned—

That Esperanto is stirring University circles. The Academical Esperanto Society of Vienna will open a course in the University there; courses in the Szechuen (China) University; Mr. Scherer, world-touring delegate of the International Central Committee of the Esperanto Movement, addressed International Central Committee of the the Fuh Tan (Shanghai) University on Esperanto with marked success. There are 1,350 students at the University. In the Tartu (Estonia) University, Professor Ahlstrand, of the Swedish Esperanto Institute, held a course of 165 pupils, among whom were several professors of the institution; Professor Collinson, of Liverpool University, will in October open two courses, elementary and advanced, at the University. He intends also to arrange a conference in Esperanto, on historical and philological subjects.

That Esperanto book-selling is beginning to pay. The Esperanto Publishing Co., Stockholm, had a turnover of 41,209 Swedish crowns for 1930 as against 22,833 for 1929. It declared a 6 p.c. dividend on a profit of 1208 crowns. The Belgian Esperanto Institute paid the same dividend; the Centra Esperanto-Librejo in Holland paid 7 p.c. The Esperanto Publishing Co., declared a dividend of 3 p.c. tax free.

From July 1929 to March 1930, there were sold in the Soviet Union Esperanto Books to the sum of 29,726 rubles (over £3000). In those nine months more Esperanto printed matter was sold than in all the preceding statistical years put together.

That for the International Jamboree

to be held in Budapest, 14/20 July, more than 100 Boy Scouts in the Hungarian capital are learning Esperanto.

That the International Esperanto Museum in Vienna contains 3,500 books, 600 complete issues of Esp. gazettes, and a mass of other material of great bibliographical worth.

That the National Union of Police for France and the Colonies has recommended the study of Esperanto to its members. Latterly Esperanto has received much attention from police circles throughout Europe.

That "Jane Eyre" (Bronte) has been translated into Esperanto by Language Committeeman, H. Bulthuis.

That the Soviet Posts has again issued stamps in Esperanto. This time, the fourth, the denominations are one and two rubles.

That S. Grenkamp is writing a life of the recently deceased Professor T. Cart, president of the Lingva Akademio.

ANATOLE FRANCE—PROFETO.

Eltiraĵoj el paroloj antaŭ simpatiantoj kun la rusa popolo. France liveris ilin en 1905, okaze de la Petersburga masbuĉo.

La Caro liveris al la glavo homojn mortantajn pro malsato kaj mizero, homojn, kies nura krimo estis, ke ili, el fundo de koro, kriplendis al li, kiel al patro sia, ke li donu al ili helpon. Iliajn fervorajn preĝojn, iliajn filecajn petvokojn, iliajn larmojn, li respondis per la vipoj de siaj kozakoj kaj la kugloj de siaj grenadistoj. Tiuj kugloj trafis ikonon lia-bildan portatan de la pastro Gapon. Tiel, ne vole, la Caro mortigis la Caron. El la sango ruĝiganta la akvon de la rivero Neva homoj

milionope levigis, por venĝi la buĉitajn viktimojn. La Caro jam mortigis la Caron, kaj ekbruligis fajron de iu revolucio, kiu glutegos la tiranon kaj tutan lian filaboron. La tago de Nikolaj Aleksandroviĉ estas jam pasinta, kaj lian memoraĵon oni universale kaj eterne malbenegos.

Nova solidareco nun hodiaŭ komencas unuigi la proletarojn de ĉiuj landoj, kaj la tago venos baldaŭ, kiam estos nur unu proletario, fortega ĉampiono por la paco.

Finkondamnita estas la lasta de la Romanov-oj..... Morgaŭ tre povas vidi finon de la Caro kaj lia reĝimo. Investo en la dua rusa monprunto estas krimo. La popola registaro, kiu sekvas la caran, ne akceptos respondecon por la pruntoj kontraktitaj post 22 Januaro 1905. La venonta rusa elektitaro ne rekonos la pruntojn, kiuj provizis financon al masbuĉo kaj civitana milito....la rublo estas sangoŝmirita kaj ĝi mallevivu valore.

ERARO.

Paĝo 265, linio 45 legu "nature" anstataŭ "native."

EXAMINATIONS.

Grupsekretarioj kaj aliaj bonvolu uzi la terminojn "Elementa" kaj "Supera" (aŭ "Komenca" kaj "Altrada") por nomi la ekzamenojn. Tiauze ili evitos la tre konfuzan vorton "Unuagrada," kiun unuj uzadas kun senco "Elementa" kaj aliaj kun senco "Supera."

(Konsilo de "British Esp-ist.")

AVERTO EL EKSTREMORIENTO

Sin bazinte sur la neceso de evoluo de la lingvo, multaj verkistoj, lastatempe, enkondukis multajn novajn vortojn en Esperanton. Tiujn vortojn ili precipe ĉerpis el la latina lingvo. La pli granda parto el ili estas balasto por la lingvo, kiun ili pli kaj pli komplikas. Atendu, sinjoroj, atendu, ne rapidu tro, ĉar se la hinoj kaj la japanoj komencos, siaflanke, enkonduki vortojn el sia lingvo, vi estos la unuaj, kiuj diros, ke la Fundamento de Esperanto malfundamentiga.

Nia opinio, oni devas krei novajn vortojn nur pro absoluta neceso, kiel diris Zamenhof. Oni do kvietanime povas diri "filmo," "anteno," "kurzo," sed la vortojn: "ekspliki," "ekskuzi," "descendi" kaj aliajn balastojn la Es-

perantistoj ne devas uzi, se ili ne volas, ke Esperanto prepariĝu al pereco.

DECI, KONVENI, TAŬGI, OPOR-TUNA.

In Millidge's dictionary "deci" is correctly defined as "to be fit, proper, becoming, as it ought to be, right, only due," and by some of the same words or their synonyms "konveni" and "taŭgi" are also correctly defined. It therefore often happens that beginners, and even some writers, incorrectly use the words, through not clearly seeing the difference in their sense. The writer in his early days in Esperanto found these words a very puzzle until over 20 years ago an article by Paul de Lengyel in "Lingvo Internacia" completely removed all difficulty. As the article probably will be of equal help to others I quote it:

"Deci" estas sekvi aŭ obei la kutimajn kondutregulojn de bonedukita societo, t.e., agadi plaĉe, kondukti neri-proĉeble. "Konveni" estas kondukti tiel, kiel la cirkonstancoj deziras. Oni povas deci malkonvene kaj konveni maldece. "Deci" povas nur persono,—"konveni" povas persono, besto (ekz. hundo, kiu ne bojas je la amiko de sia mastro), objekto (ekz. kulero, kiu estas nek tro granda, nek tro malgranda por manĝi per ĝi suppon), abstraktaĵo (ekz. juĝkondamno, kiu estas farita laŭ la koncernanta paraĝrafo de la leĝo). "Konveni" estas pli ol "taŭgi," ĉar ekz. kafkulero ankaŭ taŭgas por supmanĝo. (Everything "taŭgas" that serves, suits, is fit for, will do, answers the purpose of, even if only as a substitute for the "konvena" (proper) thing). La decreguloj estas artefaritaj de la homaro mem,—la konvenreguloj estas naturaj aŭ spontanaj, kaj la homaro ilin ne faris, sed nur ekkonis, konstatis.—Oni ne devas konfuzi la decon kun la ĝentileco, kiu estas speco de servopreteco."

[Parenthetical comment in English by G. G.]

In translation one must be guided by the context as to whether "dec" aŭ konven" is the right word, and never use "taŭg" as equivalent of either of them.

Never translate "convenient" in its ordinary present-day meaning (handy, opportune) by "konvena" but by "oportuna" (see Marko vi, 21, xiv, 11; Agoj xxiv, 25). "Convenient" in the sense of

"proper, seemly" a sin Ephesians v, 4 and Philemon 8 is rightly translated in the Esperanto Nova Testamento by "konvena."

G.G.

KION VI SCIAS?

1. Kial estas ringo de edziĝo portata je la tria fingro de la maldekstra mano?
2. Kiom da riĉoj ni havas?
3. Ĉu ŝima manĝaĵo estas venena?
4. Kiun lingvon parolis Jesuo Kristo?
5. Kiu estis dua edzo de unua edzino de Napoleono?

New Zealander in Philadelphia.

Ĉeestis kiel surpriz-vizitanto s-ro William McGuigan. Ne ofte ni gastigas samideanon de alia lando, sed tiu neatendita sinjoro antaŭ nelonge loĝadis en la vera antipodo.—Nov-Zelando! Tie, li kaj lia patrino kaj frato, nun ĉiuj loĝantaj daŭre en Philadelphia, estis aktivaj en la Esperanta movado. Kompreneble la grupo kore bonvenigis lin kiel valora aldono al la loka samideanaro, precipe post lia salutparolado, en kiu li montriĝis kiel lerta Esperantisto. (El "Amerika Esp-isto").

"ANSTATAŬA EDZINO"

de Erica Maxwell.

Traduko el la angla de M. Sampson. Eldonita de Heroldo de Esperanto: havebla ĉe B.E.A.

Prezo: 5ŝ. tolbindita; kartonita 3/6; 212 paĝoj.

Bedaŭre estas, ke la Koln-a eldonejo ne elektis ion pli indan ol la supra por reprezenti la aŭstralian literaturon. La verko recenzata estas tipa felietono, interesa ĉefe por legantoj nekritikemaj, kiuj kontentiĝas je distra romano, kies meza kvalito prezentas malmulton al la juĝkapablo.

Tamen, ne tro aŭdiĝu la pepgrumblo. Ĉe tre multe da legemuloj la cerbo ne povas, ne volas, mueli la malmolan pensgrenon troviĝantan en la rafinitaj

romanoj de la stilmajstroj. Tiuj prefere prenu al si la nune recenzatan kaj regale sorbu kun facileco rakonton pri sufiĉe stranga sortimpliko.

"Erica Maxwell" (Lillian Pyke), mortinta jam de 1927, estas bofratino de nia perdita sam batalanto, J. G. Pyke. Fervora amiko de Esperanto, ŝi netrude enteksis en ĉi-verkon menciojn pri la lingvo, kio sendube utilas ankoraŭ al la movado.

La verkaĵo estas ĝenerale flulegebla, sed la tradukinto tro ofte lasis sin influi de la angla esprimmaniero, penas traduki "vortojn" anstataŭ sencon de frazoj, kaj iuj parolturnoj, kvankam ili estos kompreneblaj al anglo, eble ne estos tiaj al alilingvanoj. Estas multaj ekzemploj de nebona uzo de vortoj, kelkaj mallertaj frazkonstruoj, kaj ieloke la leganto stumblas ĉe rekte fuŝitaj linioj. Ni pruvon havu per cito al 37/22, 15/20, prutedonis, pruntas (don'); 51/12, personigi (prezenti sin kiel); 29/36, kelkajn jarojn antaŭe (antaŭ kelke da jaroj); 41/2, pleto, kiun estis ordoninta s-ro G. (pleto, kiun alporti ordonis s-ro G.); 66/34, bolŝeviko el bolŝevikoj); (rabia, frenezfervora bolŝeviko); 115, prenu tempon (ne rapidu decidi); 122/34, mimozo estas "wattle"; 24/2/, ŝi trovos (si ne trovos); 151/20, Albanujon (Albany'on).—Robo.

KRONIKO.

Perth, Okt. Aŭst. — Ankoraŭ nia societo bone laboras, spite malbonajn vivkondiĉojn. S-ro Saar vizitis la porviran societon en la preĝejo halo ĉe Subiaco (filurbo de Perth), kaj trafe parolis pri Esperanto. Ĉirkaŭ 25 sinjoroj ĉeestis. S-ro Saar klarigis pri la deveno kaj utilo de nia lingvo kaj sciigis al kunvenintoj iom pri la gramatiko. Ĉiuj montris fortan intereson kaj kelkaj petis informojn pri lernlibroj ktp.; ili tre deziris lerni. Espereble tiuj trovos la studadon interesa kaj feliĉa okupo.

Ĉe societo por junuloj en Nedlands (Perth-parto), s-ro Byatt faris klarigan parolon, pritraktante la historion de Esp-o; li ankaŭ prezentis unuan lecionon. La ĉeestantaro bone ĝuis kaj la parolon kaj la lecionon; kelkaj volis lerni "tiun admirindan lingvon."

Melburno, Viktorio.—Je la sepa de Julio okazis la jarkunveno de la Melb. Esp. Soc. kaj la oficistoj elektitaj por la jaro estis: Prezidanto, s-ro P. Holmes; Vic-Prezidantoj, f-ino L. Irwin kaj s-ro Skurrie; Sekretario, f-ino V. Cox; Helpsekretario, f-ino L. Irwin; Kasisto, s-ro E Cox; Bibliotekisto, s-ro S. Bishop.

Granda intereso montriĝis en la instruado de Esperanto per la rekta metodo, kaj, sekve, s-ro P. Hudson iom klarigis pri la maniero de tia instruado, kaj donis simplan lecionon al la anoj.

Je la 28a de Julio f-ino H. Bostock distris la anojn per Esperanto konkurso, kaj la sukcesaj konkursintoj, f-ino Payne kaj s-ro Ballard, ricevis premiojn.

TO B.E.A. MEMBERS.

In the British Esperantist for July (p. 26) appears the statement that La Suda Krucio is the organ of the N.Z.E.A. Mr. M. Butler, who was inadvertently responsible for the error, asks the pardon of those concerned.

ESPERANTO POSTMARKOJ DE U.S.S.R.

La redaktanto de La S.K. tre volas ricevi de rusaj sam-oj kompleton de ĉiuj Esperanto-poŝtmarkoj eldonitaj de la Sovetia Poŝto, precipe la lastajn, unu-kaj-durublajn. Li intencas enkadrigi ilin orname, por montri kiel propagandaĵon ĉe vizitantoj. Rekompencon laŭinterkonsente.

TO OUR SUPPORTERS

thanks for the following, which has again made possible the appearance of our little gazette.

Mr. Cox, 4/6, June, '32; Miss Irwin, 4/6, June, '32; Mr. J. Mader, 5/-, Aug., '32; Mr. R. Pike, 4/-, Apr., '32; Mrs. Margaret Dixon, 5/-, July, '30; Miss H. Batchelor, 5/-, June, '32; Miss Griffin, sales, 2/8; Miss Hopton, 4/6, June, '32; Miss C. Hannaford, 4/6, June, '32; Mrs. Purnell, 4/6, June, '32; Mr. J. A. McDonald, 4/-, Apr., '32; Exchange on N.Z. postal-note, 1/4; Mr. G. Gordon, 5/-, June, '32; Mr. J. Hodges, 5/-, June, '32; Mr. J. Girdwood, 4/6, June, '32; Rev. Lambton, 4/6, July, '32; Miss Carrick, sales, 2/-; Dr. F. Williams,

sales and donaco, 20/-; Mr. J. Dobrich, 5/-, Aug., '32; Mr. M. Martinek, 4/6, June, '32; Masterton E. Grupo (anonco), 5/6, Apr., '32.—Total: £5/5/6.

Error, last issue: Mrs. Pocklington, 5/-, July, '32; Mr. P. Hudson, 5/-, July, '32.

Sums acknowledged up to 28th of each month.

"L.E.A. KANTARO."

Eldonita de Arbeiter-Esperanto-Bund,
Berlin C25, Dirksenstr. 42.

Kontraŭ du respondkuponoj, homoj simpatiaj kun komunisma ideologio povas havigi al si 74-paĝan poŝkantanaron de la Laborista Esp. Asocio. Jam ĝi, reviziita, fieras pri tria eldono. Por voĉa regalo nestas en ĉi tiu 28 "batal-kantoj," 7 historiaj, 8 liberpensulaj kaj 14 popolaj. Tiuj destinitaj por la senreligiuloj montras intelektan nivelon bedaŭrinde malaltan; la pens-enhavo taŭgas ja nur por infanĉambra horo, sed kuna elgorĝo de la "Proleta Marseljezo" kaj la "Kanto de la Ruĝaj Maristoj," vestitaj per vortrubandoj de flama lingvo, ne povas ne saltigi la korojn al "klasbatalemuloj."

Troviĝas kelkaj diskutindaj formoj. Uzon de "tirani" kun signifo "tiranece"; "aterist" (F. atterer, subprem(e)gi) estas tre fremda; "legioj" (legioj); ne estas permesbla elizio de akuzativo, kiel ekz., "forpeli la malamikojn al la kapitalo"; "ili rikoltu la propran semadon"; "mitraĵo" (F. mitrailleuse, mitralilo, Christaller); "por iĝu rev' realo" estas tre neplena esprimo por "por ke revo fariĝu realo"; "avia," aŭdaca per "aviada"; "privenku la klastiranec" estas iom neklara; 36/12, "kun manoj, piedoj ĉenita(j)"; "por ke vi ne povas rigardi" (pro tio, ke vi ne...); "por ke nian trafan kuglon sendi al la kapitalo" (por ke ni la trafan kuglon sendu...) "degenerato" (degenerulo); 62/3 destino (destino).

(Robo.)

RECENZOTAJ.

Julio Baghy: Printempo en la aŭtuno.

Rakonto pri dolĉe melankolia renkonto. Verkita originale en Esperanto. 114 paĝoj. 13,5x20 cm. Kartonita. Prezo 2ŝ.

Florence Barker: La Lingvo de la Bestoj.

Prelego farita ĉe la 22-a Universala Kongreso. 24 paĝoj. 10,5 x 15 cm. Broŝurita. Prezo 3p. Propra eldono de la aŭtorino.

Sigelmarkoj kun propagandoteksto por Esperanto.

En lingvoj angla, Esperanta, franca, germana, hispana kaj sveda. Trikolore presitaj. En folioj po ok markoj tekstantaj pri Radio, transoceana aviada. fervoja kaj aŭtomobila trafikoj, sporto, turismo kaj internacia komerco. La tekstoj harmonias kun rilataj vinjetoj. Unuopa marko 3,5 x 5 cm. Prezo: 10 folioj 6p. afrankite. Ĉio supra havebla ĉe Eldonejo „Heroldo de Esperanto“, Brusseler Strasse 94, Koln, Germanujo.

J. Welzl: TRIDEK JAROJN EN LA ORA NORDO. 320 pp, 16 x 22, nebindita 58., plus 10 p.c. afranko; bindita, 68., sampluse; eldonita de la Moraviaj Esperanto-Pioniroj, Olomouc Ĉeĥosl.

EN OKCIDENTO NENIO NOVA Kion ĝi instruas?

Ĉu ne,

(1) Ke malsamaj lingvoj kaj naciaj kulturoj ne povas kaŝkovri la esencan unuecon de l'homaro. Franco, germano, anglo kaj ruso emociigas de la samsamaj impulsoj de l' amo, de l' malamo, de l' kuraĝo, de l' timo. Oni vidas ilin faritaj "el unu origino, por logi sur la tuta supraĵo de la tero."

Ni pensas pri Paŭl Baŭmer en la konuskavaĵo kun la mortfrapita franco. (2) Ke la bestaĉiga influo de la masakrejoj ne povis malhelpi la ĉiamrefeŝfloradon de la unusola purblanka lilio de l' militjaroj,—sinofera kamaradeco.

Ni pensas pri la celita sed vana saviro al la vundita Katzinsky.

(3) Ke tia sanga katastrofo, kia la eŭropa militigo ankoraŭ ĉiam minacas la mondon, ĝis la tempo, kiam la popoloj liberigos el la terura sento de nepoveco regi tiujn nedifineblajn, ĝis nun nekonatajn fortojn, kiuj sučas ilin en la ruĝan kirlakvon de l' militado.

Ke la longa, malluma Epoko de Frattmortigado forpasos por ĉiam, nur tiam, kiam plenumaturogis en la kolektiva homkonscio firma kredo, ke la interbuĉado estas absurda frenezo, — nur tiam, kiam la interligitaj popoloj efikege

esprimos sian absolutan volon, ke neniam plu estu permesata tiu barbara rimedo decidi internaciajn disputojn.

Ni pensas pri la sceno en kiu la simplaj soldatoj diskutas la kaŭzojn kaj esencon de la milito.

AMRAKONTO.

El malnovaj fontoj reverkis Pan Loti.

La eta dio Kupidono ne ĉiam estis armita per pafarko kaj sagoj, sed pli frue nur portis torĉon, per kiu liflamiĝis la korojn de feliĉaj geamontoj. Tamen unufoje, laŭ diro de la Granda Poeto, la eta dio de l'amo, metinte flanken sian amigilon, kuŝis por dormi en arbaro. Dumtempe multaj nimfoj, ĵurinte je ĉasta vivo, dancetante preteris. Sed la plej bela el la ĵurintoj forprenis la fajrostangon, kiu jam antaŭe estis enamiginta legiojn da fidelaj koroj. Tiele dormante, la generalo de l'amo estis malarmita.

Nu, ĉi tiun torĉon la nimfo subigis en la akvon de apuda fonto kaj ĝin estingis. Tamen la fonto porĉiame varmigiĝis per la fajro de la amo kaj fariĝis resaniga banejo por la korpe suferantaj.

Plorĝeme la Granda Poeto poemas, ke, vekiginte, la eta dio furiozis pro la perdo de sia brulstango, kaj proklamis venĝon kontraŭ ĉiuj ĉastĵurantoj. Irinte al la dio de l'milito Kupidono havigis al si pafarkon kun sagoj, per kiuj li nun trafe-maltrafe celas la korojn de la homoj. Ne plu la eta dio promesis aŭ fidelon aŭ feliĉon al enamigintoj—kaj—la Granda Poeto amsklaviĝis al sia amatino.

Tamburas la Granda Poeto:

"Mi iris al la fonto por serĉi kuracon, sed nur povis konstati ke, 'La fajro de l'amo varmigis la akvon, 'Sed la akvo ne povas estingi la amon.'"

KONKURSO.

Ia prez. de la Sydney Esperanto Society premie donacos originalan dramon de E. Privat "Ginevra" al la samideano, kiu antaŭ la 31 Septembro divenos la nomon de "la Granda Poeto" kaj ankaŭ plej akurate indikos la versaron el lia verkaro el kiu la supra "Amrakonto" estas reverkita.

MORE ABOUT OURSELVES.

From a Sydney well-wisher comes an interesting letter in which he gives, among other things, his opinion of "La Suda Kruco." We feel impelled to answer him publicly, for we believe the open discussion to be not without interest for readers generally. He says:

"La Suda Kruco" is not a good title for a propaganda gazette. "The Australian Esperantist" or even "Esperanto sub La Suda Kruco" would be preferable. The present name would attract nobody. Furthermore, the paper is too compressed and difficult to read. The content is at times too shortened and the use of compound words to save space somewhat too frequent.

In reply to the first objection we would say that "La Suda Kruco" is NOT primarily a propaganda organ; it is, before all, a link to bind together the widely dispersed Esperantists of Australia, New Zealand and elsewhere, conveying to them news of the movement in this country and from the outside world, and supplying them with short inspirational articles and paragraphs, and a modicum of Esperanto reading matter. Together with this function, it strives to serve as a medium for bearing abroad news of Australian Esperanto activity, making known to the central organisations in Europe that the language of Zamenhof is a living thing in the far-away Antipodes. It can be called a propaganda organ only insofar as it is sent regularly to diverse publications and institutions which we deem to be good ground for such attention. As a consequence of this policy, reproductions from our pages have appeared from time to time to encourage us, but it must be confessed that direct, large-scale publicity work must be left to more powerful gazettes, such as "The British Esperantist and International Language" (the title of the now amalgamated London organ).

We agree that "La Suda Kruco" is not the best title for a propaganda organ, but as stated above the gazette is not such. One might go even further and doubt whether sense of the phrase is immediately clear to every foreign reader's understanding. "The Southern Cross (constellation)" is, perhaps, better translated by "La Suda Stelkruco." However, to change the title would necessitate re-registration at the Post Office and other formality, which in the present circumstances we think unwarranted.

True it is, that heretofore the pages have been rather too tightly packed. This is the outcome of the printer's generosity and the earnest desire of the editor to utilise to the fullest extent the limited space at his disposal. The matter is, however, one that merits consideration, and henceforth one may look for a few more rules and "whites" to relieve the denseness. We were not aware that our paper contains more compounds than the average European organ; the rather frequent use of adverbs instead of prepositional locutions is in some measure influenced by the remarkable article by Dr. Privat in "Esperanto" (April 1930).

We thank those who from time to time manifest their interest in the little paper by sending us their impressions, opinions, and suggestions; and we assure them that we will do all we can to make it ever more interesting and efficient.

"GALLANT."

(1) In the sense of "brave," "courageous," "fearless" render "brava," "kuraĝa," "sen- or maltima," but when meaning

(2) "polite and attentive to women" render "galanta" as Zam. uses it at "Batalo de l' Vivo" 58/13 and Rabeno de B. 41/16. In the sense of

(3) "gay," "fine," "splendid," "magnificent" or "showy" as regards dress

HAROLD PUDNEY

Kial fuŝe skribaĉi per kripla fontanplumo? Vi povas denove senti tiun plezuron, kiun donas facile funkcia fontanplumo, se vi alportas ĝin al H. Pudney, multjara spertiginto, kiu lerte riparos ĝin je malalta kosto ĝis re-

7 EQUITABLE PLACE, MELBOURNE.

Specialisto pri Fontanplumoj

noveco.

Ĉu nova fontanplumo kiel donaco, aŭ por vi mem? El ĉiu speco ili kuŝas ĉe li je facilaj prezoj. Aparta atento donata al poŝt-mendoj.

Notu adreson:—

or personal ornamentation one could use "bele (or peneme) vestita," "belvesta," "dande" or "belege or "grandioze" or "pompe" vestita, or some such expression as the context calls for. There is another, and unpleasant, meaning which some authors express by "kavalir'", "amaĵ'", "amaĵem'", or "amist'" (G. Dandin 25/14).

LA 3AN DE DECEMBRO, 1854. (daŭrigata)

Carboni sen ĉia ceremonio eniris lian tendon.

"Nu, kio?" demandis Lalor lakone.

"Petro, kamaraĉjo, alvenas por nin helpi dek mil el distrikto Creswick (elp. krezik). Ili venas, ili venas!"

"Ĉu ili havas sufiĉe da pafaĵo? Se ne, estus pli saĝe, ke ili restu tie. Iru, Carboni, por peni akiri pli da pulvoro ĉe la butikistoj. Donu al la vendantoj nian pagpromeson. For!"

Vendredo finiĝis, aŭ pliiĝuste dirite, neniam finiĝis, ĉar ili daŭrigis ĝin en la venontan tagon. La tutan nokton aŭdiĝis la sonorado de la forĝistaj marteloj, la krioj de la ĉefoj, la Marseillaise hore kantata de akraĵvoĉaj vagantaroj.

Sabatmatenon dudeko da buĉistaj vagonoj alvenis alportante de favoraj buĉistoj provizojn da viando por la ribelantoj.

Eĉ ne unu rajdpolicano montris sin aŭ en la urbeto aŭ sur la terplato deposed la lasta persekuto al fosistoj, kio okazis la pasintan jaŭdon.

Je tagmezo John Haynes (elp. ĝon hejnz) kun mil fosistoj nevidate de la cetero kaŝe foriris. Ili rapide aliris al Soldiers' Hill (elp. solĝerz hil), kie tendaris la soldataro.

En la tendaro estis eĉ ne signeto de vivo ĝis kiam la fosistoj venis en distancon de kvindek jardoj. Tiam surprize ekfulmis, el embusko je dekstre de la tendoj, longa kraklinio de fajro.

Kelkaj fosistoj falis. La cetero haltis. Haynes sola antaŭeniris. "Antaŭen! Antaŭen—!"

Pafilo krakis. Li ĵetis supren la brakojn kaj falis dorsaltere. Neniam li plu moviĝis.

La sendisciplina amaso terurite forkuris kvazaŭ ŝafoj, sinsave, tien-ĉien, kvankam neniu persekutis.

Lalor, en sia tendo, aŭdis la forkuregon dum la senspira hordo sin premis en la Stockade (elp. stokejd; enfermita defendoplaco). Sciiginte pri la kaŭzo de tio li kolerege pugnofermis

la fingrojn kaj flamis liaj okuloj. Kurinte ekster la tendon li saltis sur arbostumpon.

"Viroj de la Suda Kruc! Ĉu vi faris min komandanto nur por moki al mi? Ĉu vi intencas obei min? Aŭ ĉu mi estras nur minan rubon? Kiu estas kulpa pri ordono je tiu frenezaĵo? Kiu planaĉis tiun sinmortigon? Parolu iuj el vi!"

Kriis respondon Tom Mullins, vigla, juna giganto el Irlando, kiu sidis sur la tero penante foseti kuglon el la brako. "John Haynes ordonis. Ja vere!"

"Kie estas Haynes? Montru vin, vi sovaĝa Irlandano! Alvenu! Kie vi vin kaŝas? Ĉu vi tro hontas—"

"Li kuŝas sanga kadavro—tie," informis Mullins, montrante neprecize en direkto al la polica tendaro.

Gemo eliris el la homamaso.

"Kompatinda Jack (elp. ĝak)," diris pli mole Lalor. "Pacon al lia animo. Li pagis sian frenezaĵon per la vivo. Sed fine, ĉu plaĉas al vi, ke mi restu via komandanto?"

"Jes, jes, jes!" aŭdiĝis el ĉie.

Granda vejno ekelstaris nigre sur lia vasta frunto. "Pro ĉielo, do, mi mortpafos la plej sekvontan, kiu malobeos iun mian ordonon. Lessmann! Prenu kvindek elektitojn kaj patrolu la vojon Main. Mortpafu ĉiun kanajlon rabantan la butikistojn. McGill, elektu centon por postena deĵoro. Tiuĉinokte estos donita signalvorto kaj iu ajn nescianta ĝin ne povos eliri aŭ eniri tiun ĉi enfermaĵon. En la nuna tempo malkonvenas viziti la drinkbudojn. Jam malkonvene estas danci kaj kartludi! Mi avertas, ke jam de nun malobei signifas ekmorti.

Li rapide turniĝis kaj reeniris sian tendon. La viroj staris grupe. Tiu nova fazo de la afero malplaĉis multajn, kiuj enviciĝis en la ribelantaron nur por "ĝui sportaĵon."

Sunsubiro kunkondukis pluvon, kaj multaj gardistoj forlasis la postenon por ŝirmiĝi. En la mallumo dekduoj da fosistoj kaŝe iris al teatro kaj dancejo kaj kartludejaĉo kaj drinkbudo. Tremo de superstiĉa timo travivis la ribelantojn, kiam ili eksciis, ke la signalvorto por tiu nokto estas la malbonsigna "Vinegar Hill" (2). Tim Kelly de Red Hill ĵetis teren la pafilon.

"Mian maljunan patron oni mortigis ĉe Vinegar Hill. Nenia bonaĵo povos trafi nin per tiu finomo! Me ne volas

la aferon plu! Mi ne volas!

"Mi eksigas pro 'Vinegar Hill'", subvoĉis ankoraŭ alia. Tiel, tra la tuta nokto, aretoj da viroj forlasis la flagon, pri kiu ili jam antaŭe ĵuris, ke ili bataldefendos ĝin. Je la dua horo la larmema (3) patrioto Fred Vern kun granda nombro da siaj pikilegistoj malaperis kaj ne plu vidigis ĝis post semajno.

Je la kvara horo malpli ol kvarcent viroj restis interne de la enfermaĵo. Goodenough (elp. gudinuf), polica spiono, ŝteliris for. Tio estis por li facila, ĉar la plejparto el la gardistoj jam dormis ĉepostene aŭ sidis grupe ĉirkaŭ la subĉielaj fajroj.

Ĝisirinte Soldiers' Hill li informis kapitanon Thomas pri la aferstato ĉe la Stockade.

Tiu brava oficiro rapide elpensis planon. Je la kvina horo lia malgranda armeo enviciĝis apud la sidloko de la nuna stacidomo. Ĉio batalpreta! Sufiĉega pafaĵo jam donita al ĉiu viro. Thomas, sur nigra militĉevalo, finordone alparolis siajn soldatojn.

Singardeme, senbrue la ruĝvestuloj glitis malsupren laŭ la deklivo en la malluman valon. Ili ŝovis sin tra la densa kreskaĵo sur la terplato, kie nun troviĝas la kriketejo. Sen brueto ili kaŝiris ĝis la barikadoj.

Je la kvardek minutoj post la kvina, Thadeus Moore (tadius mur), unu el la malmultaj gardistoj deĵorantaj ĉe la Stockade, pensis ekvidi ruĝvestulon movantan inter la apudaj arboj.

"Parolu!" li haltige vokis. "Kiu estas vi, apud tiu arbo? Ne moviĝu Konigu vin—se ne, mi pafos!"

Nenia respondo. Sian longan pafilon levinte li ekpafis.

"Kure ataku!" kriegis Thomas, kaj dragonoj, rajdpolicanoj kaj infanterio subite forlasis ŝirmon kaj atake kuregis al la muroj.

"La Joes (elp. ĝoz)! La Joes!" (4), tranĉe kriis Moore je plenvoĉo.

Pafilo ekfulmis de la soldatoj, kaj la Irlandano falis, tordante sin kaj dolore ruglignante. Lia paroksismo subite finiĝis, kaj li kuŝis tute senmova.

La mortkrio de Moore donis alarmon al la fosistoj, kaj nun el tendo kaj barako kaj kampfajra rondo ili rapidis al defendo.

(Finota)

WESTRALIAN ESPERANTO SOCIETY kunvenas ĉiun jaŭdon je 7-30a horo vespere, ĉe 197 Murray St., Perth, kontraŭ Boans Ltd, Prezidanto, S-ro H. Byatt, D.B.E.A. Sekretariino, F-ino E. Griffin, 135 Central-av., Maylands, W.A.

Masterton (N.Z.) Esperanto-Grupo. Prezidanto, S-ro Johns; Sekretario, s-ro H. Franks, 38 Worksop-rd. Kunvenas en ĉiu mardo je la oka horo vespere en la kunvenejo ĉe la Y.M.C.A.

Auckland (N.Z.) Esperanto Societo kunvenas ĉiutage je 7.30a horo vespere ĉe Nova Preĝejo Halo (New Church Hall), Newton Road. Prezidanto: S-ro J. S. Russell; Sekretario: s-ro Jas. P. Lauder. Komunikadojn al la Prezidanto ĉe 2 Pukenui Road, Epsom.

Melburna Esperanto-Societo, Prezidanto, s-ro P. Holmes; sekretariino f-ino V. Cox. Poŝta adreso, Box 731F, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. Kunvenejo: Scots Church Hall, 97 Russell St. Marde vespere, je la oka horo. R. Banham, "Age" Reading Room, Collins-st., post la 6.30a vespere.

Sydney Esperanto Society. Kunvenas ĉiun jaŭdon de 8-10 pt. Ĉe dua etaĝo, "Manning Building," 449 Pitt Street, Sydney. Kontraŭ "Hotel Sydney" kaj apud la ĉefstacidomo. Prezidanto; s-ro E. A. Pryke, D.B.E.A.; Sekretario: s-ro Leslie E. Pfahl, 64 Brighton-st., Croydon.

Brisbano Esperanto-Societo kunvenas la 2-an kaj 4-an mardojn de ĉiu monato en salono de State Service Union, 59a Elizabeth-str.; proksime de konstruaĵo "State Insurance." Prezidanto: Maŭrico Hyde, FB.E.A. Vicprezidanto: fraŭlino Rose Macpherson, Klement Kidd. Bibliotekisto: Oskar Behncken (Del: UEA). Sekretario: fraŭlino E. B. Carrick, Office of Supt. of Telegraphs, GPO, Brisbane, Kvinslando (Queensland)

Wellington Esperanto Club.—Meets every Tuesday, 8 p.m., in the Y.M.C.A. Willis St., Wellington. Visitors always welcome. President, Mr. E. C. Jack; Vice-President, Miss Coralie Smythson; Secretary, Mr. Bertram Potts, F.B.E.A. 34, Argentine Avenue, Miramar. Treasurer, Mr. L. E. Dust, D.B.E.A., Del., U.E.A. Write for book list.